

HEJS

BULTENO DE LA HISPANA ESPERANTO - JUNULARA SEKCIO

Nro. 7

Januaro 1960



REDAKTORO: *Sro. José María Cuñat*

Sto. Valseca, 32, 1.º, 2.º Barcelono (Hispanujo)



Clisé ROLDAN

He aquí la nueva junta de HEJS. En primer término de izquierda a derecha: Sr. Pere Carreras, Sr. Salvador Aragay, Sr. José M.º Cuñat. Detrás: Sr. Tomás Allende, Sr. Pere Julià, Sr. Jordi Gumà, Sr. Ramón Jovani.

KORNVALO (Lando de legendoj)

Perranporth estas malgranda marborda urbo en Kornvalo (Cornwall) la plej sudokcidenta graflando de Anglujo. Kornvalanoj estas fakte keltoj, membroj de tiu raso al kiu apartenas la irlandanoj, skotoj, kimroj kaj bretonoj. Iam, ili havis sian propran keltodevenan lingvon, sed tiu estas nun forgesita kaj hodiaŭ la iam vivanta kulturo kaj folkloro de Kornvalo estiĝis nur historioj, rakontitaj precipe por plaĉi al la multaj turistoj kiuj vizitas ĉi tiun belan regionon.

Sed fakto estas ke la semoj de civilizacio venis tre frue al niaj bordoj. La rokoj kaj montetoj de Kornvalo enhavas riĉajn amasojn da stano kaj kupro, kiuj ĝis la nuna jarcento estis minataj.

Eĉ antaŭ la naskiĝo de Kristo, venis al ni aventuro multaj komercistoj de Fenikio, kiuj aĉetis stanon kontraŭ utilaj artikoloj de la civilizita mondo. Do, nia kontakto kun la civilizacio estis eĉ pli frua al tiu de la veraj britoj, kiuj vane kontraŭbatalis Julion Cezaron antaŭ 2.000 jaroj.

Pri tiuj fruaj epokoj ni ne multe scias. Ankoraŭ ekzistas sur la montetoj de la Okcidento la stonkonstruitaj vilagoj de la homoj kiuj enloĝis Kornvalon proksimume je la epoko de Cezaro. La domoj estas konstruitaj en rondoj, kun korto en la mezo. En la plej grandaj vilagoj estas dek, aŭ eĉ pli, da tiuj ĉi rondoj kaj pluraj apartaj vilagoj ekzistas montrante ke la enloĝantoj tie ĉi estis sufiĉe multnombraj.

La alveno de la keltaj misiistoj de Irlando estas la plej frua tempo pri kiu multaj legendoj kaj historioj estas ankoraŭ rakontataj hodiaŭ. Al Irlando venis la Kristanismo antaŭ ol ĝi atingis Anglujon kaj de tiu lando venis la unuaj misiistoj al Kornvalo.

Kasita inter la dunoj apud Perranporth, troviĝas ankoraŭ la ruinoj de du preĝejoj. La unua, ensablita de la ĉiama vento, antaŭ kelkcent jaroj kaj retrovita dum la pasinta jarcento estis tiu de la Sankta Piran, patrono de stanministoj, kaj ĝi estis konstruita antaŭ 1.500 jaroj. Hodiaŭ restas nur la malsupraj partoj de la muro de ĉi tiu antikva kaj historie valora preĝejo, kiu ŝajnas esti la plej aĝa diservloko en la tuta lando.

Per ĉi tiuj ruinoj ni povas scii kiam venis al Kornvalo Piran kaj tiuj aliaj irlandaj misiistoj kiuj batalis kontraŭ la teruroj de la Irlanda Maro por porti al ni la mesaĝon de Kristanismo. Legendoj pri la alveno de ĉi tiuj sanktuloj estas multnombraj. Laŭdire, la irlandaj paganoj ligis la kompatindan Piran al muelŝtono kaj jetis lin en la maron. Sur ĉi tiu ŝtono, tamen, li flotis ĝis Kornvalo kie li fondis sian preĝejon ĉe

Pirana Sablejo -la hodiaŭa Perranzabuloe.- La sankta Petroc (kiu fondis la preĝejon de Bodmin) ŝajne flotis ĉi tien sur sia altarŝtono, kaj la sankta Kea venis multe pli lukse per ŝtona trogo. Malgrau oi truj fantaziaĵoj, ni almenau personoj alvenis. hodiaŭ restas multaj lokoj kiuj portas la nomojn de ĉi tiuj sanktuloj, kaj videbla al ĉiu estas la ruinoj de tiu unua preĝejo de Piran, monumento al la persisto kaj kuraĝo de homoj kiuj sin donis por la civilizacio kaj la Kristana Meŝaĝo.

HUMPHREY R. TONKIN

Secretario de Junularo Esperantista Bri

NIA JAPANA SAMIDEANINO JOSIKO KAŜINO EN GERMANIO

La ĉarma japana samideanino Joŝiko Kaŝino, vizitis la urbon Oberkirch. (Baden), kie ricevis ŝin, la urbestro, kaj samideano S-ro F.W.Poppeck. Si, akompanta de s-ro Poppeck, vizitis paperfabrikej, la redakcion kaj presejon de la loka gazeto kaj la grupvesperojn. Joŝiko Kaŝino restis en Oberkirch, unu semajnon kaj aranĝis tre interesaj publikan "Japana Vespero".

PRI LA VIVO DE NIA SANKTA PATRO JOHANO XXIII

Jen tre interesaj informoj pri Lia Papa Mosto Johano XXIII kiujn publikigi la revuo "Espero Katolika" ĉe la monato decembro de la jaro 1958.

25-XI-1881: naskiĝo en Sotto il Monte, norda Italujo.

1900-1904: teologia studo en Romo.

10-VIII-1904: pastro

1914-1918: ĉe la fronto kaj en la malsanulejon por helpi la vunditojn.

1921-1925: ĉe la S. Kongregacio de la "Propaganda Fide"

1925: Episkopo.

1925-1930 en Sofio, Bulgarujo.

1935: en Turkujo kaj Grekujo.

1944-1953: nunco en Parizo kaj unua reprezentanto de la Sankta Seĝo ĉe la UNESKO.

1953: kardinalo kaj patriarko de Venezio.

20-X-1958: Papo.

Estonta papo, Lia nomo estis, Kardinala Mosto Anĝelo Jozefo Roncalli.

SPONTANA GENERADO ?

Nuntempe, eble pro influo de la ĉiam tro divastiĝanta materialismo, estas multaj personoj tra la mondo kiuj facilanime akceptas, ke kelkaj mikroorganismoj sponte nee elnaskiĝas.

Jam de antaŭ multaj jaroj oni kredis, ke multaj malsuperaj animaletoj spontane naskiĝis sen iu ekstera influo. Versajne jam la grekaj filozofoj apogis la teorion, jesinte ke multaj bestetoj devenis el putriĝinta materio aŭ koto.

Dum la Mezepoko eĉ la skolastikaj filozofoj defendis jenan tezon. Tiamaniere jam ne miregas ke, tiamaj naturistoj estis apogantoj de tiaj senbazaj asertoj. Oni diris ke la musoj kaj vermoj spontane eliĝis el putriĝinta karno. Ke el tri-tiko enmetita en poton stopitan per malspura ĉemizeto devenis musoj. Ke lumkrikoj tute sen antaŭa ĝermo naskiĝis el la koto, en visceroj de mortintaj bovoviroj abeloj, en ŝlimo de la rivero angiloj. Samstile multajn aliajn nepruveblajn hipotezojn kiujn ili erare kredis.

Dum la XVIIIa jarcento floris fama scienculo nomita Helt - mont kiu firme certigis ke la musoj devenis el miksaĵo de paperaĉoj, ĉifonoj kaj iom da mucida faruno diverstempe forlasita ene de fermita ŝranko. Li mem faris diversajn eksperimentojn por konstati la spontan generadon. Oni rakontas ke estis preparita ŝipo kiu antaŭe estis tute purigata. En ĝi li enmetis la mencitajn materialojn por sperti strangan ekkarniĝon. Ŝajne bonsukcesis ĉar vere poste li trovis musojn, sed poste lia aserto estis kontraŭigata. (Daŭrigota)

Alfred Santacana

TEMPESTO SUPER AKONKAGVO

de Tibor Sekelj (libro kiu jam aperis en 12 lingvoj)
 aperos ankau en Esperanto. Prezo (inkl. sendkostoj)
 a) bindita, kun aparta kovrilo al,egalvaloro 2.00 Dolaroj.
 Petu al Serbia Esperanto Ligo. Terazije 42. Beograd.

INFORMACION

46 CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO EN MADRID.-

El presidente de "Madrida Esperanto-Klubo" recibió del Ministerio de Asuntos Exteriores, la siguiente comunicación:

Ministerio de Asuntos Exteriores
 Relaciones Culturales: 3.061.3 (46)
 Madrid, 13 de Octubre de 1959.

En contestación a su instancia de fecha 15 de junio, - por la que solicita autorización para celebrar en la primera quincena del mes de agosto de 1961 el 46 Congreso Universal de Esperanto, cúpleme comunicarle que, por lo que a la esfera de competencia de este departamento se refiere, no hay inconveniente alguno en que dicho congreso se celebre en la fecha prevista.

Dios guarde a V. muchos años.

(EL DIRECTOR GENERAL)

A FINALES del pasado mes de noviembre de 1959, ya se hallaban inscritas al próximo Congreso Universal de Esperanto, - que tendrá lugar en Bruselas, 304 personas de 28 países distintos.

EN EL PROGRAMA de estudio de la Universidad Popular de Bayreut, Alemania, y para el otoño-invierno actual, se menciona en su página 33, un curso de Esperanto para principiantes.

EN VARSOVIA y como consecuencia del brillatísimo 44 Congreso Universal celebrado el pasado verano en dicha ciudad, ha surgido un enorme interés por el Esperanto, y en septiembre dieron comienzo los primeros cursos con una participación de 350 alumnos en total. Según informaciones recibidas, se espera que durante el invierno funcionarán unos 50 cursos en la capital de Polonia.

PARALITICA Y CIEGA desde hace cinco años, una señorita finlandesa de 18 años, estudió con fervor el Esperanto. Si alguien pudiera facilitarle libros esperantistas con sistema Braille, haría una obra de caridad. Su dirección es: F-no Ritva Koivula, Kunnalliskoti, Riste. FINLANDO.

INFORMES DE SECRETARIA

Lamentablemente, muchos socios barceloneses no acuden a nuestras reuniones. Este año al igual que el anterior nuestras actividades deben desenvolverse en una grata atmósfera. La junta agradecería a todos los socios una cooperación personal, - asistiendo a las tertulias cada sábado en la calle de Pino, - 11 de 7.30 a 9 horas para poder lograr más compenetración entre todos nosotros.

Brevemente indicamos que el próximo congreso juvenil internacional tendrá lugar en Rotterdam del 23 al 30 de julio. Posiblemente el congreso juvenil internacional del año 1961 tendrá lugar en Barcelona, ello nos crea la necesidad de delegar algunos jóvenes para que acudan a Rotterdam este año. Por ello rogamos a los asociados que deseen representar nuestra sociedad en el próximo congreso, sírvanse indicárnoslo con tiempo suficiente para poder informarlos ampliamente.

Ha llegado a nuestro conocimiento que varios socios no han recibido los pasados números de nuestro boletín, Precisamente en estos momentos no poseemos más ejemplares de los números pasados. No deseando una repetición de lo ocurrido, máxime ahora que se editará el boletín cada mes, rogamos que los socios que a primeros de mes no reciban su boletín nos lo comuniquen. Rápidamente se les enviará otro ejemplar gratuitamente.

Siendo nuestro principal deseo informar a todos los socios, de los nuevos miembros de nuestra sección, cada mes indicaremos los altas y bajas de los mismos, así como los que han efectuado el pago de su cuota.

Pagaron su cotización los siguiente socios: Sr. José Castro, Sr. Salvador Aragay.-Sr. Pere Julia,-Sr. Tomás Allende.- Sr. Rodolfo Canet.- Sr. Ramón Jovani.

Altas- ninguna

Bajas- ninguna

Enviad vuestra cotización al Sr. Ramón Jovani, Pasaje Pujós, 19 Hospitalet (Barcelona). con la mayor brevedad posible.

UN LIBRO MUY INTERESANTE ADEMAS DE NECESARIO.-
VOCABULARIO ESPERANTO-ESPAÑOL del Dr. E.Tudela Flores 172, - páginas. Formato 21 x 16. Precio. 85 pesetas. Pedidos al autor. Calle Ruzafa, 45 - VALENCIA.

-EN SPLIT ESTIS ENMARIGITA LA POLA ŜIPO "ZAMENHOF"-

Laŭ antaŭaj informoj Pollando intencis honori la Zamenhof -Jaron i.a. per nomigo de ŝipo laŭ la, aŭtoro de Esperanto. Tiu ŝipo devus esti konstruata en Gdansk. La sekvanta informo pruvas evidente, ke la unuaj informoj ne estis tute precizaj.

La 12an de julio de 1959, en ŝipfarejo "Split" en Split (Dalmacio, Jugoslavio) okazis la solena bapto kaj enmarigo de transoceana ŝipo "Zamenhof", kiun la nomita ŝipfarejo konstruis por la pola firmo "Polskie Linie Oceaniczne" en Gdynia. Baptopatrinino de la nova ŝipo estis s-no Helene Grochulski, edzino de la ambasadoro de Pola Respubliko en Beograd. La solenaĵon partoprenis ankaŭ la delegito de UEA, s-no Aleksa Hrstiĉ kaj delegito de Jugoslavia Esperanto Federacio, Prof. Josip Velebit, esperantistoj el Split kaj ĉirkauaĵoj kaj la vasta publiko.

La transŝipo "Zamenhof" estas 154 Metrojn longa, 18'80 metrojn larĝa kaj 12 metrojn alta; ĝi posedas ŝargopovon de 12.800 tunoj kaj havas motoron "Fiat" de 6000 ĉevalpovojn. Pleneŝargita ĝi desvolvas rapidecon 15 marmejlojn hore.

"Zamenhof" estas dua en serio de sep santipaj ŝipoj, kiujn la ŝipfarejo "Split" laŭ ĝisnuna konvencio konstruas por Pollando. Oni antaŭvidas, ke en la nuna jaro la ŝipfarejo finkonstruos kaj liveros la ŝipojn "Zamenhof" kaj ankaŭ "Chopin" al la pola komerca floto.

(Transkribis al "Heroldo" - J.M^a. Cuñat.)

LA URUGVAJA KARDINALO D-ro BARBIERI AMIKO DE ESPERANTO.

En la lasta konsistorio Papo Johano la 23^a faris sen - precedencan distingon al la Katolika Eklezio en Urugvajo ĝia metropolitano D-ro Antonio M^a Barbieri, ĉefepiskopo de Montevideo, estas promociita al la rango de kardinalo.

La nova, klera kaj virta, urugvaja kardinalo, plurfoje elmontris sin granda amiko de Esperanto, kiun li apogis. Laŭ propra iniciato kaj persone subtenis en diversaj okazoj.

MUZIKOJazz-muziko

La vorto jazz, naskiĝis en Ĉikago, ĉirkaŭ la jaro 1915. Okaze de kontrato kon la orkestro Tom Brown por ludi en la kafejo de Lamb.

Ĉar la muzikistoj ne apartenis al la Sindikato, la lokaj profesiuloj intencis timigi la kafejon, lokante antaŭ la eja pordo, vicon da anonco-homoj kunportintaj grandajn afiŝojn, sur kiuj estis skribita la jena frazo: La muziko kiunoni ludas en la Kafejo de Lamb estas jazz-muziko.

Tio ĉi signifis ke la muzikistaro de Tom Brown ludadis en la plej fia kvartalo de la urbo, ĉar la vorto jazz estis la plej aĉa nomo el la bordela slango por difini la seksajn interrilatojn.

La kafeja mastro ne lasis pasi la okazo kiu prezentigis al li, konvertante tiunfakton je disvastiĝanta notico per multe da propagando.

Post kelkaj tagoj, la sama mastro anoncis la orkestron Tom Brown, kun la jena nomo: Jazz-band, tio estas, muzikistaro de jazz-j.

Tiamaniere estis, kiel posiom poste, oni eknomis jazz, la muzikon ludata de tiu orkestro.

Oni ne povas nei ke la jazz-muziko alportas ŝatindajn muzikajn satisfakciojn al multaj personoj, sed tiu malsama fonto da emocio bezonas procedojn entute novajn, anstataŭ, tiuj uzataj ekzemple, ĉe la simfoniamuziko, ĉe la opera-muziko. La negroj, estas kreintaj ĉiujn nature, sen intelektaj aŭ stetikaj aŭ estetikaj perfe t

La menciitaj procedoj de la jazz-muziko sukcesas nur ĉe la malplimulto, la alia parto, ne konsentas ilin,

Giaj malamikoj antaŭdiris la baldauan morton de la jazz-muziko, sed la jaroj estas pasintaj kaj la jazz-muziko estas vivanta ankoraŭ.

Lau Honegger "Modo, kiu daŭras post preskau duonjarcento, jam ne estas modo, sed epoko.

Tomás Allende

RIMARKO:

Mi volas konsili al la tuta hispana geesperantistaro kiu eksterlande korespondas, ke klare skribu sian adreson sur la leterpaperon aŭ poŝtkarton.

Mi senescepte volas respondi al la tuta eksterlandanaro kiu skribas al mi, sed kelkfoje bedaŭrinde, mi ne povas, ĉar multaj adresoj estas tute nekompreneblaj.

Ni devas klopodi por efektiviĝi ĉi tiu konsilon,

TRIA KRUCVORTA ENIGMO

HORIZONTALE: -1) Granda, danĝera rampulo vivanta en grandaj riveroj de Hindujo kaj Afriko.- 2) (Inv.) Granda, laŭ vertikala direkto. (Inv.Rad.) Koloro. -3) (Inv.) Prepozicio montranta tempon pli malfruan ol alian. (Inv.) Havi en la brakoj kaj ne ellasi. -4) Aerveturilo, aviadilo. -5) Persono kiu studas pri monumentoj kaj artoj de la antikva epoko. -6) (Rad.) Serio da lecionoj, konsistiganta regulan instruon pri scienco aŭ metio. (Inv.) Stulte rigardi kun la buŝo malfermita. -7) (Rad.) Riverfiŝo (Rad.) Longa vermo vivanta en intesto de homo. -8) Parto de la horizonto kie la suno ŝajnas subiri.

VERTIKALE: -1) Okula malsano. -2) (Rad.Inv.) Tiu, kiu posedas ordonpovon, ĉefo. (Rad.Inv.) Suba membro de homo aŭ besto. -3) (Inv.) Ciu parto de la teatraĵo, ludata de ĉiu aktoro. (Rad.) Ĉe antikvuloj, fostego en kiu estis fiksita transversa trabo, sur kiu oni lasis morti krimulojn. -4) Parto de la korpo. Verbo esprimanta la ekziston. -5) Prepozicio. -6) (Rad.) Boraparato konsistanta el stango en kiu estas fiksita borilo kaj kiu povas rapide turniĝi. (Rad.Inv.) Hemiaĵo = C_2H_2 . -7) (Rad.Inv.) Organa tubo, tra kiu fluas sango aŭ alia korpa fluidaĵo. (Inv.) Filo de la filo. -8) (Rad.) Granda, mola kaj spongeca glando, ĉe maldekstra flanko de ventro. (Rad.) Manvesto. -9) Parto de la metafiziko studanta la problemon pri la esto kaj ĝia kaŭzo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									

J.M.Gutiérrez.

(Hejs--Delegito en Madrido.)